

Raporto de la Ĝenerala Sekretario al la Ĝenerala Asembleo
“Kune tiri dum elprovaj tempoj: Sekurigi pli bonan estontecon por ĉiuj”
Novjorko, 23 septembro 2010

Sinjoro Prezidanto, Estimataj Statestroj kaj Estroj de Registaroj, Estimataj Delegitoj,
Gesinjoroj,

Bonvenon al Novjorko en tiu ĉi bela aŭtuna sezono, kaj bonvenon al la malfermo de tiu ĉi 65-a ĝenerala debato.

Sinjoro Prezidanto, gratulojn.

Mi kun plezuro antaŭvidas proksiman kunlaboron kun vi en la venonta jaro, trans tuta gamo da defioj frontataj de nia komunumo de nacioj.

Moŝtoj, Gesinjoroj,

Ni, la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj, estas ligitaj de certaj sanktaj devoj kaj devigoj:

- Prizorgi la bonfarcon de aliaj.
- Solvi konfliktojn paco.
- Agi en la mondo kunsente kaj kompreneme,
- Praktiki toleron kaj reciprokan respekton kiel fundamentan principon de la civilizo.

Hodiaŭ, oni elprovas nin. Sociaj malegalecoj kreskas, inter nacioj kaj ene de nacioj. Ĉie homoj timas perdi siajn postenojn kaj enspezojn. Tro multaj homoj kaptiĝis en konfliktoj, kie virinoj kaj infanoj ĉefe suferas.

Kaj ni vidas evolui novan politikon – politikon de polusigo.

Ni aŭdas la lingvon de malamo, de falsaj dividoj inter “ili” kaj “ni”, de tiuj, kiuj insistas pri “sia vojo” aŭ “nenies vojo”.

Ĉirkaŭite de tia necerteco, tioma konfuzo de celoj, ni nature serĉas moralan kompason.

Ĉe Unuiĝintaj Nacioj, ni trovas la ĝustan padon en komuneco, tutmonda celaro, justaj decidoj, reciproka respondeco pri la sorto, kiun ni ĉiuj kundividas.

Moŝtoj, Gesinjoroj,

Jen la animo de tutmonda kunregado, la temo de la nuna Ĝenerala Asembleo -- komuna starpunkto, laŭprincipa kaj pragmatisma, kontraŭ fortoj, kiuj celas dividi nin. Kaj jen kial Unuiĝintaj Nacioj restas la nemalhavebla tutmonda institucio de la 21-a jarcento.

Kunvenante hodiaŭ, solidare, ni rekonu, ke:

- Temas pri sezono kiam ni kune tiru, kiam ni firmigu progreson, kiam ni metu niajn ŝultrojn al la rado kaj liveru rezultojn.
- Verajn rezultojn, por homoj, kun plej grandaj bezonoj, kiel povas fari nur Unuiĝintaj Nacioj.

Moŝtoj, Estimataj Delegitoj

Komune, tra la pasintaj tri jaroj, ni alproprigis ambician tagordon, en la kadro de tri tegmentaj ideoj de nia epoko:

- Pli prospera mondo, libera je la plej profunda malriĉeco,
- Pli pura, pli verda, kaj pli subtenebla mondo por niaj infanoj,
- Pli sekura mondo, libera je nukleaj armiloj.

Jen la grandaj defioj de nia epoko. Ili ne estas revoj. Ili estas realaj eblecoj, ene de nia kapablo ilin kapti. Kune, ni faris progreson.

Ni daŭrigos – kun freŝaj pensoj, freŝaj aliroj, forta sento de gvidkapablo, kaj politika obstino.

La Pintkonferenco pri la Jarmilaj Evoluigaj Celoj montris nian kolektivan firmecon. Mondaj gvidantoj kunvenis kun konkretaj naciaj planoj por atingi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn ĝis la jaro 2015. Ili interkonsentis respondecan kaj reciproke kontroleblan partnerecon -- partnerecon, kiu plibonigos la vivojn de miliardoj de homoj ene de la tempo de nia generacio.

Plenumi tiun promeson estas nia defio -- transformi esperojn en realaĵojn.

Ni devas ĉerpi el la lecionoj lernitaj dum la pasinta jardeko:

- Helpi homojn helpi sin mem;
- Investi rimedojn tie kie ili plene efikos – lerta investado je edukado, digna laboro, sano, etnivela agrikulturo, substrukturo kaj verda energio;
- Aparte emfazi la gravecon de virinoj.

Pro tio, en la Pintkonferenco, mi bonvenigis la aprobon de nia Tutmonda Strategio por Virinoj kaj Infana Sano. Subtenate de miliardoj da dolaroj de novaj sindevigoj, fare de registaroj, entreprenoj, neregistaraj organizaĵoj kaj filantropiaj institucioj, tio konsistigis palpeblan esprimon de tutmonda solidareco.

Jen kial, pasintsemajne, mi nomis dinamikan novan estron de UN-Virinoj. Per Michelle Bachelet, eksa Prezidento de Ĉilio, ni trovis mondan gvidanton kiu kapablas inspiri milionojn da virinoj kaj knabinoj ĉirkaŭ la mondo. Ni devas apogi ŝin ĝis maksimumo, ĉar, povigante virinojn, ni povigas sociojn.

Gesinjoroj,

Antaŭ tri jaroj ni nomis klimatsanĝiĝon la "difina defio" de nia epoko, kaj ĝi restas tia. Klare, la vojo al ĉionenhava, deviga interkonsento, en Kankuno kaj poste, ne facilos.

Tamen, ni progresis, kaj ni povas plie progresi. La nuna jaro estas jaro por konstrui sur gravajn terenojn de interkonsento – sur financadon por adaptado kaj mildigado, sur transigon de teknologio, konstruon de kapablo, kaj malhelpon de arbarforigado.

Pli longperspektive ni frontas la defion "50-50-50": ĝis la jaro 2050, la nombro de la monda enloĝantaro kreskos je 50 procentoj. Por teni klimatsanĝiĝon je nulo, ni devos tranĉi varmigogasajn emisiojn je 50 procentoj ĝis tiam.

La mondo atendas de ni kreoplenajn solvojn.

Kaj pro tio, dimanĉon, ni gastigis la unuan kunvenon de nia altnivela Teamo pri Tutmonda Subteneblo. Mi plene fidis, ke ĝi stimulos novan pensadon survoje al Rio-plus-20 en la jaro 2012.

Ankaŭ ĉe nuklea malarmado ni vidas novan impulson: Novan interkonsenton START, la Pintkoferencon pri Nuklea Sekureco, sukcesan konferencon por rekontroli la Traktaton pri Nedismultiĝo. Nia rolo estas daŭre puŝi, por trovi vojon apliki la Traktaton pri Ĝenerala Ĉesigo de Testoj, por realigi interkonsentojn pri fendebaj materialoj kaj pri sekurigo de nukleaj materialoj kaj instalaĵoj.

Morgaŭ ni gastigos altnivelan kunvenon por renovigi la Konferencon pri Malarmado.

Mi kredas, ke la venontaj kelkaj jaroj estos kritike gravaj. Ĉu ni antaŭenigos nian laboron pri nedismultiĝo kaj malarmado, aŭ ĉi ni retroglitos? Ĉio dependas de ni.

Moŝtoj, Gesinjoroj,

Kiel ĉiam, dum la pasinta jaro, ni apudis por helpi tiujn, kiuj pleje bezonis nin:

- La homoj de Pakistano, traktantaj epopeajn inundojn kaj la enorman taskon de rekonstruo;
- La homoj de Haitio, kie la rekonstrua laboro daŭras, kaj kie tiel multaj perdis la vivon, inkluzive 101 niajn kolegojn;
- La homoj de Somalio, Sudano, Niĝero, Gazo.

Kiel ĉiam, ni daŭrigos la laboron por paco kaj sekureco.

- Antaŭ tri jaroj, partnere kun la Afrika Unio, ni engaĝis la unuan packonservan forton en Darfuro.
- Dum la venonta jaro, Unuiĝintaj Nacioj ludos kritike gravan rolon en tenado de pli granda paco dum norda kaj suda Sudano decidis sian estontecon. La Altnivela Kunveno pri Sudano, okazonta morgaŭ, helpos elmapi tiun vojon.
- En la Demokrata Respubliko de Kongo, ni adaptis nian mision por fronti novajn kaj ŝanĝiĝantajn cirkonstancojn.
- Ni proksime kunlaboris kun la Afrika Unio en Somalio.
- Ni ankaŭ spertis venkojn fare de preventa diplomatio.
- En Irako ni helpis negoci la kompromisojn, kiuj tenis sur la ĝusta vojo la balotadon de la nuna jaro.
- En Gvineo, ni kune staras kun regionaj partneroj por insisti pri demokratio.
- En Sieraleono, ni helpis trankviligi disputojn kaj ebligi antaŭeniron de paco.
- Lerta diplomatio helpis limigi la perturbojn en Kirgizio.
- En Afganio ni daŭrigas nian laboron spite al malfacilaj sekureco kaj humanaj kondiĉoj.
- Ni klopodos redukti streĉitecojn en la Korea Duoninsulo kaj instigi la Demokratian Popolan Respublikon de Koreio reveni al la Sespaciaj Diskutoj.
- Rilate Iranon, ni daŭre instigas la registaron engaĝiĝi konstrueme kun la internacia komunumo kaj plene sekvi la koncernajn rezoluciojn de la Sekureca Konsilio.
- En Mezoriento, ni rimarkas kuraĝigan moviĝon al ĉionenhava paco. Laborante kun la Kvaropo, ni faros ĉion eblan por helpi stiri la negocojn al sukcesa konkludo. Mi forte malinstigas iun ajn agadon, fare de unu aŭ alia partio, kiu povus malhelpi progreson.

En ĉio, kion ni faras, la homaj rajtoj centras. Ne povas esti paco sen justeco. La tutmonda komunumo diligente kaj longe laboris por enkonduki novan "epokon de respondeco." En nia moderna erao, ni sendu klaran mesaĝon: Neniu nacio, granda aŭ malgranda, rajtas rompi la rajtojn de siaj civitanoj sen konsekvencoj.

Moŝtoj, Estimataj Delegitoj, Gesinjoroj,

Mi fermu per aludo al la temo, kiu difinis nian kunlaboron: konstrui pli fortan UN por pli bona mondo.

- La renovigo de nia Sekretariata Domo antaŭeniras ĝisdate kaj laŭbuĝete.
- Organizaj ŝanĝoj enkondukitaj en la pasintaj kelkaj jaroj donas frukton.
- Inter ili: la iniciato "Novaj Horizontoj" por plifluigi la pacigajn operaciojn.
- Konsulte kun la Membraj Ŝtatoj kaj nia stabo, ni faros ĉion kion ni kapablas por krei pli rapidan, pli modernan, flekseblan kaj efikan laborforton, kaj rekruti la plej grandan talenton de morgaŭ.

Ŝtatestroj kaj Estroj de Registaroj, Estimataj Ministroj, Gesinjoroj,

Hodiaŭ kaj en la venontaj monatoj mi parolos pri multaj temoj – gravaj demandoj, kiuj tuŝas la tutan homaron.

- Ni memoru, en tiuj ĉi nunaj malfacilaj tempoj: oni elprovas nin.
- Ni memoru la multajn vivojn perditajn dum servado al niaj idealoj.
- Ni memoru, ke la mondo ankoraŭ atendas de Unuiĝintaj Nacioj moralan kaj politikan gvidadon.

La grandaj celoj troviĝas ene de nia atingokapablo.

Ni povas aliri ilin per rigardado antaŭen, tenado kune, unuigante niajn fortojn kiel komunumo de nacioj, nome de la pli granda kolektiva bonfarto.

Ban Ki-moon

*El la angla originalo tradukis esperanten: Humphrey Tonkin
La originala teksto de la parolado estas legebla je la sekva adreso :*

*Secretary-General Ban Ki-moon, General Assembly, 23 September 2010
[Report to the General Assembly - "Pulling Together in Testing Times: Securing a Better Future for All"](#)*

